

POLA ESPERANTISTO

Monata Organo de Polaj Esperantistaj Societoj.

ESPERANTYSTA POLSKI

Organ Towarzystw Esperantystów Polskich.

Marto 1908.



Jaro I (III). No 3.

Redakcia Komitato:

Komitet Redakcyjny:

Redakt. D-r Leon Zamenhof

Dr. K. Bein (Kabe)
Leo Belmont
A. B. Brzostowski

Antoni Grabowski
Stanisław Schels
A. Zakrzewski

Al la Komitato helpas per siaj konsiloj la Aŭtoro de Esperanto

D-r Ludwik Zamenhof.

ENHAVO:

„Pri lingvo internacia“, de A. Grabowski.—„Cirkulera letero“, de D-ro L. L. Zamenhof.—„La jugho de Oziris“, de H. Sienkiewicz, trad. A. Grabowski.—„Mia amiko“ de Cart.—„Funebra marŝo“, de Kornel Ujejski, trad. Lozo.—„Dua cirkulero de la „Kvaro por la Kvara“. —Kroniko.—Tra la gazetaro.—Bibliografio.—Avizoj.

TREŚC:

„O języku międzynarodowym“, Ant. Grabowski.—„Okólnik“, D-ra L. L. Zamenhofs.—„Sąd Ozyrysa“, H. Sienkiewicza, tł. Ant. Grabowski.—„Mój przyjaciel“ Cart.—„Marsz żałobny“, Kornela Ujejskiego, tł. Lozo.—Drugi okólnik komitetu czwartego kongresu.—Kronika.—Przeгляд prasy — Bibliografja. — Zawiadomienia.

Adreso de la Redakcio:

WARSZAWA,
(Varsovio)

Marszałkowska 143.

Abonprezo — Prenumerata

Jare—rocznie: 2 rb.=5,00 fr.=4 mrk.
Duonjare—półrocznie 1 rb.=2,50 fr.=2 mrk.
kun transsendo kaj aldono literatura.
zprzesyłką i dodatkiem literackim.

Adreso de la Administr.:

WARSZAWA,
(Varsovio)

Hoża No 40, m. 8.

F. Kozłowski OBECNIE S. NOWACKI

Warszawa, Rymarska 7, róg Leszna. — Telefon 39-99.

NAJTAŃSZE ŹRÓDŁO: Lamp, Porcelany, Fajansu, Szkła, Galanteryi, Noży, Widelcy etc., etc. Wynajmuje nakrycia stołowe, platery, bieliznę, krzesła, stoły.

ZYRANDOLE kościelne i salonowe do świec i gazu. Wielki wybór. Najniższe ceny. Reperacye i odnawianie żyrandoli.

W wielkim wyborze przyzmy kryształowe do żyrandoli. Jedyny palnik naftowo-żarowy bez wszelkich komplikacyi 60% oszczędności nafty. Komplet rub. 3.

ZAKŁAD BRONZOWNICZY W. Komorowski i S^{-ka} WARSZAWA

Nowy-Świat № 12. — Telefon № 188-82.

Wykonywa do elektryczności: Żyrandole, lampy, pendle plafoniery i t. d. — Cenniki ilustrowane na żądanie.

Fabryka i Magazyn J. Kuczmierowski

Warszawa, Marszałkowska 108.

Poleca: Siodła, zaprzęgi, przybory podróżne, oraz galanterję skórzaną w wielkim wyborze.

Cenniki na żądanie.

SKŁAD MEBLI

Majstrów Stolarskich

Jana Berezińskiego

w Warszawie, ul. Królewska 6.

wprost Mazowieckiej.

≡ ROBOTY TAPICERSKIE ≡

Dekoracye stylowe i fantazyjne.

Telefon 51-52.

„MODERNE” Wyborne MYDŁO
F. PULS.
TOW. AKC. w WARSZAWIE
DOSTAĆ MOŻNA WE WSZYSTKICH LEPSZYCH PERFUMERJACH.

Sztuka Bronzownicza i Złotnicza

PISMO MIESIĘCZNE, FACHOWO-SPOŁECZNE ILUSTROWANE.



Prenumerata roczna 1.80
z odnośnieniem do domu . . . 2.00
z przesyłką pocztową 2.50



Adres: Warszawa, ul. Czerwonego Krzyża 3.

Zakład Introligatorski S. Lipowskiego

WARSZAWA

ul. Złota № 3.

Telefon 198-17.

Biuro Nauczycielskie K. Wasilewskiego Marszałkowska 123.

Rekomenduje nauczycieli, nauczycielki i bony różnych narodowości.

Skład Papieru R. KRUPECKI WARSZAWA

Wierzbowa № 1. — Telefon 10-16.

POLECA: Materiały piśmienne i rysunkowe. Księgi buchalteryjne i t. p. Dostawa do biur i kantorów.

JAPANA

ESPERANTISTO

Oficiala monata organo de Japana Esperantista Asocio.

La sola gazeto Esperanto-propaganda
Redaktata de Orientuloj mem.

En Esperanto kaj Japana lingvo, kun ilustraĵoj. — Artikoloj speciale Japanaj, literaturo, moroj, tutmondaj informoj, korespondoj k. t. p.

Jara abono: **1.60 sm**

(Kun aniĝo al la Asocio: **2 sm**)

Nur de landoj nehavantaj internacian poŝtmandaton ni akceptas monerojn kaj papermonojn kun la aldono de **10%**.

Redakcio kaj Administracio:

JAPANA ESPERANTISTA ASOCIO

3 ĉome, Jurakĉo, Kojimaĉik, Tokio.

== Dwudziesty siódmy rocznik ==
rozpoczęła z dniem 1 stycznia b. r.

„Nowa Reforma”,

wychodząca w Krakowie dwa razy dziennie
o godz. 5 rano i pół do 6 po południu.

„NOWA REFORMA” jest najpoczytniejszym
dziennikiem polskim,
wychodzącym w Galicyi.

Prenumerata wynosi:

w Krakowie rocznie: 24 kor., półrocznie: 12 kor., kwartalnie: 6 k., miesięcznie: 2 kor., w Austro-Węgrzech. z jednorazową przesyłką pocztową rocznie: 32 kor., półrocznie: 16 kor., kwartalnie: 8 kor., miesięcznie: 2 kor. 70 hal., z dwurazową rocznie: 38 kor., półrocznie: 19 kor., kwartalnie: 9 kor. 50 hal., miesięcznie: 3 kor. 20 hal., w innych państwach rocznie: 48 kor., półrocznie: 24 kor., kwartalnie: 12 kor., miesięcznie: 4 korony.

OGŁOSZENIA (inseraty) przyjmuje Administracja „Nowej Reformy” za opłatą od miejsca w ersza drobnem pismem (petit) za pierwszy raz 20 h., a za każdy następny raz po 10 h. — NADEŚLANE po 60 h. od wiersza za każdy raz.

GŁOSY PUBLICZNE po 2 kor. od wiersza. Układ tabelaryczny cyfrowy, skomplikowany pierwszy raz 40 hal., następny po 10 hal. od wiersza.

ZALĄCZNIKI do „Nowej Reformy” (prospekty, cyrkularze, ogłoszenia i t. p.) przyjmuje się za cenę 2 k. od 100 egz. dla zamiejscowych, a 1 k. od 100 egz. dla miejscowych prenumeratorów.

Prenumeratę i ogłoszenia (inseraty) uprasza się nadsyłać wprost do ADMINISTRACYI „NOWEJ REFORMY” w Krakowie.

Adres Redakcyi i Administracyi: Kraków, ulica JAGIELŃSKA 10.

W Królestwie i Cesarstwie prenumeratę na „Nową Reformę” przyjmują wszystkie urzędy pocztowe.

1908. Zaproszenie do przedpłaty na Rok X.

„Nowości Muzyczne”

JEDYNE PISMO LITERACKO - MUTOWE,

poświęcone celniejszym utworom fortepiano-wym współczesnych polskich i zagranicznych kompozytorów.

Na treść pisma składają się utwory: klasyczne, salonowe, taneczne, wyjątki z oper i operetek.

W dziale literackim: liczne wiadomości z życia muzycznego.

Ptenumerata wynosi: Miesięcznie kop. 42 z przesyłką poczt. kop. 50; Kwartalnie rb. 1 kop. 25 z przesył. poczt. rb. 1 kop. 50. Półrocznie i rocznie w tymże stosunku.—Za granicą rb. 7. — Zeszyt pojedynczy kop. 60.

Premia bezpłatne dla rocznych abonentów:

trzy poprzednie zeszyty, lub portret Chopina, artystycznie wykonany podług słynnego obrazu Antoniego Kolberga; na przesyłkę premium dołączyć należy kop. 20.

Adres Redakcyi: Warszawa, Krak.-Przedm. 6.

Casopis Českých Esperantistů,

oficiala organo de bohemaj Esperantistoj,
publikigas senpage adresojn de fremdaj
(ne bohemaj) samideanoj, kiuj deziras
trovi korespondantojn inter Bohemoj.

Qni sendu ilustritan poŝtkarton kun adreso kaj rimarko, pri kio oni volas korespondi al „Redakcio de Časopis de Českých Esperantistů en Praha”, aŭ al iu konsulo de Esperantista Klubo: p-o Ing. J. Hofmann, Praha-Smichov Smetanova ul. 13; p-o Arch C. Cyrill Nebuška, Praha II.

Jenštejnská ul. 4.

„Głos Lekarzy“

DWUTYGODNIK, POŚWIĘCONY SPRAWOM ZAWODOWYM LEKARSKIM, DEONTOLOGII LEKARSKIEJ I MEDYCYNIE
SPOŁECZNEJ

Wychodzi rok VI we Lwowie,
1-go i 15-go każdego miesiąca

POD REDAKCJĄ

D-ra Szczepana Mikołajskiego.

PRENUMERATA ROCZNA

6 koron = 6 marek = 3 ruble.

Adres redakcji i administracji: D-r Szczepan Mikołajski, Lwów, ul. Śniadeckich 6.

„GŁOS LEKARZY“ wydaje co miesiąc osobny dodatek esperancki, przeznaczony dla korespondencji międzynarodowej lekarzy.

„Głos Lekarzy“

==== (VOĈO DE KURACISTOJ) ====

DUONMONATA GAZETO, DEDIĈITA AL LA PROFESIAJ AFEROJ DE LA KURACISTOJ, AL LA DEONTOLOGIO KURACISTA KAJ AL LA MEDICINO SOCIALA.

aperadas de VI jaroj en Lvovo
la 1-an kaj 15-an de ĉiu monato.

REDAKTORO

D-ro Stefan Mikołajski.

JAR-ABONO

6 koronoj = 6 markoj = 3 rubloj.

Adreso de la redakcio kaj administracio:
D-r Stefan Mikołajski, Lwów, str. Śniadeckich 6.
Austrio-Galicio.

„GŁOS LEKARZY“ eldonas ĉiumonate apartan aldonon esperantan, dediĉitan por la korespondado internacia de kuracistoj.

Warunki prenumeraty

w Warszawie:

Rocznie Rb. 5

Na prowincji

Rocznie Rb. 6

Adres Redakcji

i Administracji

Aleja Jerozolimska 80.

Telefon 58-98.

FARMACJA

Organ Tow. Wzajemnej Pomocy „Farmacja“

POŚWIĘCONY POSTĘPOM NAUK FARMACEUTYCZNYCH I PRZYRODNICZYCH ORAZ

SPRAWOM ZAWODU.

Wychodzi 10 i 25 każdego miesiąca w Warszawie.

Ceny ogłoszeń:

Za całą stronę rb. 10.—

Za pół strony rb. 6.—

Za ćwierć stron. rb. 3.50

Za 1/2 strony rb. 2.—

Na zewnętrznych stronach okładki 25% drożej.

Przy ogłoszeniach powtarzanych odpowiednie

ustępstwa. Drobne ogłoszenia po kop. 15 od

wiersza.

Georg Davidov, Russie, Saratov, Kesto 12

deziras aĉeti:

Nº 13. Hanez — Safach achalt lekalanu, pagas 1½ rubl.

Nº 22. H. Phillips — An Attempt towards an Inter. Lang., pagas 1 rubl.

Nº 23. Hanez—Lernolibro, eld. hebrea-germana.

Nº 40. Gurevich—Sefer Hamilin pagas 1½ rubl.

kaj la librojn 25, 32, 39, 47, 50, 55, 58, 66, 69, 82, 97, 99, 100, 102, 108, 110.

Pagas altan prezon.

La Saksa
Esperantisto

deziras korespondantojn en ĉiuj terpartoj. Leterojn k. t. p. oni sendu rekte al la Redaktoro Fritz Stephan en Leipzig, kiu Senpage dissendas specimenajn numerojn.

POLA ESPERANTISTO

Monata Organo de Polaj Esperantistaj Societoj



ESPERANTYSTA POLSKI



Organ Towarzystw Esperantystów Polskich

Marto 1908.

WARSZAWA — VARSOVIO.

Jaro I (III). № 3.



LA JUÛO DE OZIRIS.

SĄD OZYRYSA.

O Języku Międzynarodowym.

Rzecz wygłoszona przez A. Grabowskiego na posiedzeniu Towarzystwa Kultury Polskiej w Warszawie, d. 13 lutego r. b.



Szanowni Słuchacze! Wieczór dzisiejszy poświęcamy omawianiu kwestji języka międzynarodowego; mam więc odpowiednim referatem zagaic następującą po nim dyskusję. Czuję jednak trudność tego zadania, bo jakże można w krótkim przemówieniu przedstawić jasno i wyczerpująco zagadnienie, nad którego rozwiązaniem od lat trzystu pracowały setki umysłów, tworząc całą obszerną literaturę. Krótkim konspektem tej literatury jest dzieło o 600 stronicach, profesorów Couturat i Leau „Histoire de la langue universelle“.

Nie mogąc nawet streszczać tej pracy, w której autorowie omawiają kilkadziesiąt prób języków sztucznych, zaznaczę tylko ich podział na systemy a priori i a posteriori.

Pierwsze, nie licząc się z językami naturalnymi, szukają nowych dróg do wyrażenia myśli ludzkiej i wtłaczają ją w układy cyfr lub dźwięków, z którymi wiążą różne pojęcia. *Systemy a posteriori* natomiast starają się zbliżyć jaknajwięcej do języków naturalnych, z których czerpią prawie wszystkie swoje pierwiastki.

Przedstawicielem *pierwszej* grupy jest np. projekt Sotos Ochanda, zaś *drugiej* Esperanto; między temi dwiema grupami stoją jeszcze t. z. *systemy mieszane*, do których trzeba zaliczyć głośny swego czasu Volapük. *Systemy a priori*, głęboko uczone i filozofujące, były w rezultacie tak trudne do opanowania, że o ich praktycznym zastosowaniu ani mowy być nie mogło. Volapük, przedstawiciel systemów mieszanych, znalazł narażenie dość licznych adeptów, ale upadł prędko, gdyż był zbyt trudnym, i jeśli nim pisali ludzie, (mówiących prawie nie było), to ani na chwilę nie rozstając się ze słownikiem, którego dziwaczna, do niepoznania wykoślawiona niemczyzna, zapamiętać się nie dała.

Ostateczne rozwiązanie zagadnienia dał dopiero rodak nasz, Dr. Ludwik Zamenhof, ogłaszając w r. 1887 w Warszawie swój „Język Międzynarodowy“ pod pseudonimem D-ra „Esperanto“, który to pseudonim stał się z czasem nazwą samego języka. Autor Esperanta stworzył język, przypominający swą dźwięcznością włoski lub hiszpański, a przytym giętki, bogaty i nad wyraz łatwy. Osiągnął on to w sposób następujący:

Materiał czerpał z języków nowoczesnych, uwzględniając przede wszystkim ten nowołaciński materiał słowny, który jest dzisiaj wspólny całemu światu cywilizowanemu — w nauce, sztuce i technice. Weszły więc do Esperanta prawie wszystkie słowa, przyswojone językowi polskiemu z łaciny, greki lub języka francuzkiego, i wspólne prawie u wszystkich narodów kulturalnych. Np.

doktor, telefon, teatr, koncert i t. p. Mamy ich w języku polskim kilkadziesiąt tysięcy.

Istnieje jednak wiele pojęć, na które takich wspólnych słów niema. Tu Esperanto dobiera słowa, które w tej lub owej formie najpowszechniej są znane. Weźmy np. ząb, зуб, Zahn, tooth, dent, dente — które z nich wybrać? Otóż wszystkie prawie języki europejskie posiadają wspólny wyraz „dentysta“; ztąd więc ząb po esperancku oznacza się pierwiastkiem „dent“.

Ale i ten materiał słowny nie wystarczyłby jeszcze do stworzenia języka giętkiego, bogatego i łatwego. Tę wielką syntezę poprzedzić musiała wielka analiza, której potrzebę uczuł już trzydziestu lat temu Kartezjusz, ale której nie umiał sam dokonać, bo dokonana być mogła dopiero po uprzedniej pracy kilkunastu pokoleń różnych myślicieli. Kartezjusz pisze d. 20 grudnia 1629 do Oj. Marsenna: „Si' quelqu' un avait bien expliqué quelles sont les idées simples qui sont en l'imagination des hommes, desquelles se compose tout ce qu' ils pensent, et que cela fut reçu par tout le monde, j'oserais espérer ensuite une langue universelle fort aisée à apprendre, à prononcer et à écrire — Or je tiens que cette langue est possible“.

Otóż tego rozbioru pojęć złożonych na pojęcia proste dokonał w sposób gienjalny twórca Esperanta. Stałe symbole tych pojęć prostych dają w swym połączeniu słownym nietylko słowo, ale i zarazem przezroczystą definicję tego słowa. Cały więc język układa się ze stałych pierwiastków, które wyrażają różne pojęcia i panujące między niemi stosunki. W chemji kilkadziesiąt symbolów, oznaczających pierwiastki, na które rozłożono materję, wystarcza do wyrażenia i określenia dziesiątek tysięcy związków chemicznych, całego otaczającego nas świata materialnego. W Esperancie kilkaset takich symbolów pojęć prostych wystarcza do wytworzenia nieskończonej liczby pojęć złożonych, zupełnie racjonalnych, na które często w języku naturalnym trudno byłoby znaleźć odpowiedniki, tak iż tylko dłuższemi określeniami zastąpić je można. Na tym polega cała, słusznie sławiona giętkość i bogactwo Esperanta.

Na pojęcie króla mamy n. p. symbol „reg“, na pojęcie osobnika płci żeńskiej „in“, na pojęcie dziecka „id“; symbol, oznaczający stałą istotną własność, jako pojęcie oderwane, jest „ec“, symbol rzeczownika (tego co jest) „o“, symbol przymiotnika „a“, symbol bezokolicznika „i“. Tak więc rego = król, regino = królowa, regido = królewicz, regidino = królewna, regeco = królewskość.

reĝa = królewski, reĝi = królować. Jeŝli więć koko=kogut, to kokino = kura; kokido = kurczę; kokidino = kokoszka i t. d. Podobnież, jeŝli: cervo=jeleń, to cervino=łania, cervido=jelonek, szpiczak; cervidino = mała łanka. Tak więć od kaźdego pierwiastka wyprowadzić możemy cały szereg słów pochodnych i zatym materiał słownikowy, który zapamiętać musimy, redukuje się do minimum.

Podobnie jest z formami gramatycznymi. Ucząc się języka francuskiego, zapamiętać musimy kilkanaście tysięcy różnych form konjugacyjnych na osoby, czasy i tryby, jak to wyliczył jeden z filologów francuskich. Esperanto nie zna nic podobnego. Tworząc symbole na zaimki (np. mi = ja, vi = ty, li = on i t. d.) i oznaczając znakami: — as, — is, — os, pojęcia teraźniejszości, przeszłości i przyszłości, daje możność wyrażenia kaźdego słowa w tych trzech czasach, usuwając za jednym zamachem cały balast naszych zwykłych gramatyk. Rozwiązując w po-

dobny sposób inne kwestje gramatyczne, autor Esperanta daje możność nauczenia się całej gramatyki języka międzynarodowego w przeciągu jednej godziny.

Kaźda nauka, wznosząc się na wyższy szczebel rozwoju, wprowadza stałe symbole; tak jest z arytmetyką i algebrą, chemją, fizyką i t. p. W innym miejscu wykazałem, jak wprowadzenie symbolów gramatycznych ułatwia nietylko naukę Esperanta, ale robi zeń znakomite przygotowanie do nauki innych języków, nie wyłączając oczystego (Esp. Pol. Nr. I).

Nie mogę się jednak dłużej zatrzymywać nad budową jęz. Esperanta, i te kilka uwag musi wystarczyć; natomiast postaram się odpowiedzieć na różne zarzuty i pytania, które słyszę od lat przeszło 20 od ludzi, którzy się kwestją języka międzynarodowego nie zajmowali i wskutek tego nie mogą mieć o niej należytego pojęcia.

(Dokończenie nastąpi).

CIRKULERA LETERO

de D-ro L.-L. Zamenhof

Al ĉiuj Esperantistoj.

Varsovio, la 18-an de Januaro 1908.

En la jaro 1900, kiam la esenco de la internacilingva afero estis ankoraŭ tro malmulte konata kaj la mondo pensis, ke ekzistas diversaj lingvoj internaciaj, kiuj inter si batalas, sinjoroj Couturat kaj Leau en Parizo fondis „Delegacion“, kies celo estis: peti la Internacian Ligon de Akademioj, ke ĝi esploru, kiu el la ekzistantaj artefaritaj lingvoj taŭgas plej bone por la rolo de lingvo internacia, aŭ elekti mem komitaton, kiu esplorus tiun ĉi demandon. Kvankam, de la jaro 1900 ĝis nun, la vivo jam mem solvis la diritan demandon, tamen, por prenumi sian promeson, la Delegacio, en Oktobro 1907, kunvokis komitaton, kiu devis elekti lingvon internacian. Sed bedaŭrinde la komitatanoj ne ĝuste komprenis sian taskon, kaj, elektinte Esperanton, ili decidis fari en ĝi *reformojn*, forgesante, ke tia tasko tute ne estis kaj neniam povis esti komisiita al ili. Tiu ĉi tre bedaŭrinda decido estis kaŭzita de kelkaj tre gravaj malkompreniĝoj:

1) Oni forgesis, ke la afero de lingvo internacia estas nun ankoraŭ en la stato de *propagando*; ke la mondo ne akceptas lingvon internacian ne pro tiuj aŭ aliaj ĝiaj *detaloj*, sed nur pro malkonfido al la *tuta* afero; ke sekve nun ĉiu vera amiko de lingvo internacia devas absolute silenti pri siaj personaj gustoj kaj gustetoj, kaj ni ĉiuj devas antaŭ ĉio labori en plej severa *unueco*, por ke ni akiru por nia afero la *konfidon* de la mondo. Kiam nian aferon prenos en sian manon ia granda *forto* (ekzemple la registaroj de la ĉefaj landoj), kiu per sia potenco povos doni al ni ne senvalorajn tro memfidajn vortajn promesojn, sed plenan *garantion*, ke ĝi alkondukos nian aferon al la celo

pli certe ol ni kaj ke ĝi ne faros facilanime iajn decidojn, antaŭ ol ili *tute mature* kaj perfekte estos pripensitaj kaj praktike *elprovitaj* kaj *fiksitaj*, tiam ni povos konfide transdoni al tiu potenco forto la sorton de nia afero; sed se *privataj* personoj, kiuj havas nek ian aŭtoritaton, nek ian forton, postulas, ke ni forlasu la vojon, kiun ni paciencie kaj sukcese sekvis en la daŭro de multaj jaroj, kaj ni komencu plej danĝerajn rompajn eksperimentojn, ĉiuj veraj esperantistoj energie protestos. Nun, kiam ni estas ankoraŭ tro malfortaj, ni povas atingi nian celon nur per *severa disciplino* kaj per *absoluta unueco*; alie ni pereigos nian tutan aferon por ĉiam, por ĉiam; ĉar kiu scias, kun kia grandega malfacileco kaj per kia superhome pacienca dudekjara laborado de multaj miloj da personoj estas atingita la nuna favora rilato de la mondo al nia afero, tiu komprenas, ke se, pro interna malpaco, Esperanto nun pereus, la mondo jam neniam, *neniam* volos ion aŭdi pri ia nova lingvo internacia, eĉ se ĝi estus ne senviva teoria produkto de multaj reciproke malproksimaj kapoj, sed la plej genia kreitaĵo! Mi ripete memorigas tion ĉi al la reformistoj, mi ripete kaj insiste petas ilin, ke ili pripensu, kion ili faras, ke ili ne ruinigu tiun grandan kaj gravan aferon por kiu ni ĉiuj laboras kaj por kies ebla pereco la posteuloj iam severe nin juĝus.

2) Oni forgesis, ke ne sole eĉ en sia nuna formo Esperanto en la praktiko montriĝis perfekte taŭga por sia rolo kaj ke plibonaĵo povas fariĝi danĝera malamiko de bonaĵo, sed ke se eĉ *efektive* aperus la neceseco plibonigi Esperanton, la solan kompetentecon kaj rajton por tio ĉi havas ne flankaj personoj, sed nur la *esperantistoj mem*

Kaj en ĉiu momento, kiam plibonigoj montriĝos efektive necesaj kaj ĝustatempaj, la esperantistoj tre facile *povas* ilin efektiviĝi. Ĉar ĉiu rakontado pri ia baro, kiun kvazaŭ prezentas la Bulonja Deklaracio, aŭ pri ia kvazaŭa senviveco kaj senforteco de nia Lingva Komitato, estas simpla malvero, per kiu oni penas fortimigi de ni tiujn personojn, kiuj ne konas bone la staton de la aferoj.

Ĉiu, kiu legis la antaŭparolon de la „Fundamento de Esperanto“, scias tre bone, ke ĝi ne sole ne prezentas ian baron kontraŭ la evolucio de la lingvo, sed kontraŭe, ĝi donas al la evolucio tian grandegan liberecon, kiun neniu alia lingvo iam posedis eĉ parte. Ĝi donas la eblon, se tio estus necesa, iom post iom eĉ ŝanĝi la tutan lingvon ĝis plena nerekonobleco! La sola celo, kiun la Fundamento havas, estas nur: gardi la lingvon kontraŭ anarĥio, kontraŭ reformoj *arbitraj* kaj *personaj*, kontraŭ danĝera *rompado*, kontraŭ forĵetado de malnovaj formoj antaŭ ol la novaj estos sufiĉe *elprovitaj* kaj tute definitive kaj sendispute *akceptitaj*. Se la esperantistoj ĝis nun tre malmulte faris uzon de tiu granda libereco, kiun la Fundamento al ili donas, ĝi ne estas kulpo de la Fundamento, sed ĝi venas de tio, ke la esperantistoj komprenas tre bone, ke lingvo, kiu devas trarabati al si la vojon ne per ia potenca dekreto, sed per laborado de amasoj, povas disvolviĝi nur per tre singarda vojo de natura *evolucio*, sed ĝi tuj mortus, se oni volus ĝin disvolvi per kontraŭnatura kaj danĝeriga vojo de *revolucio*.

Cetere, se la Bulonja Deklaracio efektive prezentus ian malbonaĵon aŭ neprecizaĵon, kiu do malpermesas, ke iu proponu ĝian ŝanĝon aŭ eĉ ĝian tutan forigon? Jes, tiuj sinjoroj, kiuj sub la influo de agitantoj diras, ke la „Fundamento“ prezentas „eternan baron kontraŭ la evolucio de Esperanto“, parolas pri afero, kiun ili tute ne konas!

Ĉar la Lingva Komitato ĝis nun faris ankoraŭ neniun rompon en la lingvo, tial la reformistoj ĝin kulpigas, ke ĝi estas senviva, senforta, senaŭtoritata, sentaŭga! Sed se ĝi estas malbona, kiu do malpermesas, ke la esperantistoj mem ĝin reorganizu? Anstataŭ semi malkontentecon, malpaco kaj ribelon, ĉu ne estas pli bone, se iu el la malamikoj de la nuna Lingva Komitato prezentus projekton de reorganizo de tiu ĉi komitato? Se la projekto estos bona, ĝi ja certe estos akceptita; mi povas eĉ sciigi la malkontentulojn, ke la prezidanto de la Komitato mem preparas nun projekton de reorganizo, kiun li intencas prezenti al la plej proksima kongreso. Per vojo de paco kaj harmonio ni ĉion povas krei, per vojo de malpaco kaj ribelo ni ĉion nur detruos.

Por fari reformojn en Esperanto, la „Delegacia Komitato“ ricevis komision nek de la esperantistoj, nek de siaj propraj delegintoj (kiuj ne donis, sed eĉ ne *povis* doni tian strangan komision); siajn proprajn, de neniu rajtigatajn postulojn de reformoj — kiuj apogis sin sur zorge kolektitaj voĉoj de kelka nombro da malkontentuloj, sed tute ignoris la opinion de multaj dekmiloj da personoj, kiuj estas kontraŭ ĉiuj ŝanĝoj — la Delegacia Komitato prezentis al la esperantistaro en formo tre ofenda, postulante, ke la tuta multe-

mila kaj longe laborinta esperantistaro akceptu la decidojn, kiujn kelkaj flankaj personoj ellaboris en la daŭro de 8-10 tagoj; ili eĉ malhumile postulis, ke tiuj decidoj estu akceptataj *tuj*, ne atendante la esperantistan Kongreson; tial la sola respondo, kiun ni devis doni al la postulantoj, estus simpla kaj tuja rifuzo. Sed ĉar troviĝis personoj, kiuj per ĉiuj eblaj rimedoj komencis grandan kaj lertan agitadon inter ĉiuj esperantistoj, penante per ĉiuj fortoj ruinigi la harmonion, kiu ĝis nun regis inter ni, penante semi malpaco kaj malkontentecon kaj kredigi al ĉiu aparte, ke ĉiuj postulas reformojn, nur la ĉefoj kontraŭstaras; kaj ĉar ni komprenis tre bone, kiel pereiga povas fariĝi por nia tuta afero ĉia publika malpaco kaj skismo, precipe se ĝi al la nenion scianta publiko estas tute malvere prezentata kiel „deziro de multaj socjetoj“; tial ni en la daŭro de tri monatoj faris ĉion, kion ni povis, por kvietigi la ribelantojn en ia paca maniero. Ni multe korespondis kun ili, penante klarigi al ili, kiel danĝeriga ilia agado estas por tiu afero, kies amikoj ili sin kredas; ni prezentis la demandon al la voĉdonado de ĉiuj membroj de la Lingva Komitato; kaj kiam la Lingva Komitato refuzis akcepti iliajn strangajn kaj tro grandajn postulojn, mi eĉ decidis, ke mi *mem* en mia propra nomo prezentos al la esperantistoj iliajn plej ĉefajn postulojn, kvankam mi tute ne vidas en ili ian nesesaĵon; sed ni nur deziris, ke ĉio estu farata sen rompado, per vojo laŭleĝa; ke ĝis la komuna akcepto la novaj formoj estu rigardataj ne kiel devigaj, sed nur kiel permesataj, kaj ili ricevu forton nur tiam, kiam la Lingva Komitato ilin aprobas kaj Kongreso esperantista donos al ili sian sankcion.

Sed ĉiuj penoj de pacigo nenion helpis. La postulantoj respondis, ke por ili ne estas aŭtoritata nia Lingva Komitato, nek nia Kongreso, kaj ili rezervas al si plenan liberecon de agado.

Tiam ni estis devigitaj rompi ĉiun intertraktadon kaj sciigi, ke la „Delegacia Komitato“ por ni plu ne ekzistas. Laŭ la propra tute preciza programo de la „Delegacio“, la Komitato ricevis de siaj delegintoj la komision nur *elekti* lingvon; de la momento, kiam tiu elekto estis farita, la „Delegacia Komitato“ ĉesis ekzisti kaj restis nur kelkaj *privataj* personoj, kiuj — laŭ siaj propraj vortoj — fariĝis nun esperantistoj. Sed kiam tiuj kelkaj novaj esperantistoj, kiuj aliĝis al Esperanto nur antaŭ malmultaj semajnoj, ekdeziris dikti leĝojn al la tuta popolo esperantista, kiu laboras jam pli ol dudek jarojn, kaj ĉiuj niaj admonoj nenion helpis, tiam ni simple lasis ilin flanke.

Ni estas konvinkitaj, ke tiuj kelkaj scienculoj, kiuj lasis sin entiri en reton, baldaŭ komprenos la eraron, kiun ili faris; ili baldaŭ komprenos, ke nia gravega kaj malfacilega afero povas atingi sian celon *nur per severa unueco*; kaj pro la bono de ilia amata ideo ili baldaŭ discipline aligos siajn fortojn al tiu komuna granda armeo, kiu sen personaj ambicioj, en plena harmonio, kaj kun ĉiam kreskanta sukceso, pacience laboras jam tiom multe da tempo. Kiel ĝis nun, tiel ankaŭ plue, ni, esperantistoj, iros trankvile nian vojon.

L. L. Zamenhof.

La juĝo de Oziris.

El egipta papiruso pole tradukis

Henryk Sienkiewicz.

Kiam en Egipto mortis la filo de Tutnetaŭgis, Tutnetaŭgis *), la ĉefa ministro de iu Tutmes **) el iu dinastio, reganta antaŭ la envado de la Hiksoj, tiam du senmortaj Ideoj ekmalpacis pro lia animo tiel varmege kaj plenigis per tia bruego la senfinajn spacojn de la silenta eterneco, ke la ĉiopova Oziris ordonis al ili aperi antaŭ si kaj demandis:

— Kiuj vi estas, ho spiritoj, kaj kiu estas la pekinto, kiun mia akcipitra okulo ekvidas inter vi, kaj pro kio en la regno de l' Silento vi kverelas, kiel du marĉandistinoj el Memfis?

Tiam respondis la unua el la spiritoj:

— Mi, sinjoro, estas la senmorta Malsageco. Mi zorgis la ĉeestantan Ekscelencon Tutnetaŭgis, kiel amanta patrino. Mi diktis al li ĉiujn liajn vortojn, mi estis lia gvidantino en ĉiaj faroj. Mi ne forlasis lin eĉ por momento, kaj ĉar ankaŭ li tenis mian vestaĵon konstante kaj fidele, ĉar dum la tuta vivo li estis, laŭ egipta proverbo, malsaĝa kiel tabla piedo, sekve mi volas forpreni nun lian animon kaj loki ĝin en la transtera lando, kiun mi regas, kaj kiu estas destinita por eterna sidejo de malsaĝuloj.

Oziris turnis sin al la dua spirito:

— Parolu nun vi—li diris, prenante en la manojn la pesilon, per kiu li pesis ĉiajn pensojn, vortojn kaj agojn.

— Mi, ho sinjoro, estas la senmorta Malnobleco. Mi tute ne neas, ke Lia Moŝto Tutnetaŭgis plenumis ofte sur sia alta posteno erarojn konvenajn al azeno, sed mi certigas, ke antaŭ ĉio li estis kanajlo. Se vi permesos, sinjoro, mi citos al vi miloblajn pruvojn, kiujn la Malsageco, pro tio, ke ĝi estas Malsageco, neniam scios refuti.

— La Malsageco — interrompis la Astur-okula, suprenlevante sian providencan fingron — nur ne scias konstrui,

anstataŭ tio, ofte ĝi scias renversi, kion dirinte paranteze, mi demandas, kion vi postulas?

— Mi volas, ho sinjoro, forpreni tiun-ĉi animon kaj loki ĝin en la transtera lando, kiun mi regas, kaj kiu estas destinita kiel postmorta eterna sidejo por la friponoj.

Tion dirante, ĝi kaptis la manon de Tutnetaŭgis, sed en la sama momento la Malageco kaptis lian duan manon kaj ambaŭ, haltigante la spiron en la brustoj, atendis la verdikton de la Justulo.

Kaj la Justulo fiksas sian birdan rigardon sur Tutnetaŭgis, rigardis lin atente dum pli longa tempo, kaj fine li diris:

— Mi vidas, ke ambaŭ vi havas rajton al li, do volonte mi vin aŭskultus kaj juĝus, sed laŭvere, la situacio estas stranga. Jen viaj pruvoj, ho Malsageco, estos malsaĝaj, kaj viaj, ho Malnobleco, malnoblaj. Pro tio, mi ilin ne povas konsideri, kaj sekve al neniu el vi mi povas doni la permeson paroli. Kion do ni devas nun fari? Jen mi alvokos la Sagecon, kiu ĉion penetras, kaj mi ordonos al ĝi, ke ĝi prezentu al mi en mallongaj, sed saĝaj vortoj la vivon de Lia Ekscelenco, kaj ankaŭ vian aferon.

-- Ho, Sinjoro,—murmuretis la Malsageco,—la Sageco estas mia persona malamikino.

La Justulo suprenlevis ree sian providencan fingron.

— Kredu al mi, ho Malsageco, ke la vera Sageco estas egale malamikino de la Malnobleco, kiel ankaŭ de vi.

Kaj en la sama momento li alvokis la Sagecon, kiu tuj venis, kaj, ekrigardinte Tutnetaŭgison, ne ekmiris, ĉar la Sagecon mirigas nenio; sed ĝi ekridetis kvazaŭ kun kontenteco kaj diris.

— Ah! Jen estas Lia Ekscelenco, kiu per sekreta cirkulero al la guberniestroj malpermesis al mi restadi en Egipto!...

*) Sienkiewicz nomas lin „Psunabudes“.

**) La vica nombro estas nelegebla.

— Pro la bono de l' ŝtato, mian vorton de honesteco... — komencis senkulpiĝi Tutnetaŭgis.

Sed Oziris ordonis al li silenti, kaj demandis mem:

— Diru al mi, ho Saĝeco, ĉu tiu malpermeso estis pli malsaĝa aŭ pli malnobla?

— Egale, tute egale! — respondis la Saĝeco.

Do la Justulo metis egalajn pezilojn sur la pes-teleretojn, apogitajn je la ŝtupo de lia trono.

— Parolu plu—li diris — por ke ni fine eksciu, kiu el la ambaŭ spiritoj devas zorgi pri la plej ĝusta sidejo por Lia Moŝto.

Kaj la Saĝeco komencis mallonge rakonti la tutan vivon de Tutnetaŭgis, de la frua juneco ĝis la lasta momento de lia tera vojaĝo. Ĝi memorigis, kiel en la akademio, en la centpordega Tebo, li estis fervora liberalo, kiel poste, fariĝinte ŝtata oficisto, li baldaŭ enskribiĝis en la nomaron de ŝtataj agantoj kaj mokis la principojn, kiujn li konfesis dum la studenta tempo; kiel li sub la signaldiro: „Egipto por Egiptanoj“ laboris por kunigi la ŝtaton sub la regado de la memfisa burokratio, kiel fine, en la longa daŭro de sia ofico, li ĉiam iun suspektis, ion flarsentis, kontraŭiu elsendis raportojn, ĉiam antaŭio avertis, ion malpermesis, ion malfermis, ion kvietigis, kaj anstataŭ plivastigi la homan agecon kaj la homan vivon, konstante ilin abomenigis, katenis kaj limigis.

— Ĉu vi ne opinias, ke tio estas friponaĵoj? — interrompis Oziris — alĵetante pezilon sur la pesteleron de la malnobleco.

— Mi ne neas, ho Ĉio-enhava,—rediris la Saĝeco; sed mi permesos al mi fari la rimarkon, ke estis en tio ankaŭ malsaĝeco tiel granda, kiel la piramido de Heops, ĉar Tutnetaŭgis, laborante kvazaŭ por la potenco de Egipto, efektive ĝin malfortigis,—laborante kvazaŭ por ĝia gloro, efektive ĝin senhonorigis, laborante kvazaŭ por la ordo en la ŝtato, li puŝis ĝin en senordon kaj kreis al ĝi internajn malamikojn, kaj ĉe tio neniam en lia malkapabla kapo naskiĝis eĉ por unu momento la penso, ke la tuta lia laboro povas nur kaŭzi malutilojn kaj malvenkojn.

— Laŭ tio — diris la Justulo — oni devas alĵeti pezilon ankaŭ sur la teleron de la malsaĝeco.

— Oni devas! — ripetis la Saĝeco — sed aŭskultu min, ho sinjoro, plue. Poste Tutnetaŭgis fariĝis guberniestro de la norda provinco Phath, loĝata precipe de Fenicianoj kaj Grekoj, kaj tiel same la unuajn kiel la duajn li komencis fervore transformi en Egiptanojn. Li malpermesis al ili paroli kaj skribi sur papirusoj en propra lingvo, persekutis ilian religion, fermis iliajn lernejojn, kaj antaŭ ĉio li ordonis al ili porti kufojn, kiuj, kiel oni scias, estas la nacia egipta kapokovrilo. En lia konvinko la kufo prezentis la Egiptanon, sed kiaj pensoj bolis en la kapoj, kiujn li devigis porti kufojn, tion konsideri li ne estis kapabla. Sed tiuj, kiuj ne volis porti kufojn, povis liberiĝi de ili per koruptumo, ĉar tiamaniere kreskis la havaĵo de la guberniestro.

Oziris suprenlevis triafoje sian fingron kaj diris serioze:

— Koruptumoj ne pruvas malsaĝecon.

— Certe, sinjoro, sed ne alĵetu ilin sur la teleron de l' malnobleco, ĉar en Egipto ĉiuj altranguloj rigardas la prenadon de koruptumoj kiel kutimon tiel ĝeneralan kaj tiel konvenan al la antikva tradicio egipta, ke ili prenas ilin kun tute pura konscienco.

— Vi estas prava, kaj, kiel dio egipta, mi ne devis tion forgesi. Do mi ne alĵetos ion sur iun teleron, antaŭ ol vi diros, kia maniere agis Tutnetaŭgis, kiel ministro de-l' Faraono?

— Egipto, kiel vi scias, ho Justulo, bezonis grandajn kaj fundamentajn reformojn. Jen Tutnetaŭgis, fariĝinte ministro, klopodis antaŭ ĉio, ke tiuj reformoj ne estu grandaj kaj fundamentaj, sed malgrandaj kaj supraĵaj. Egipto bezonis novajn kaj saĝajn homojn, kiuj estus amikoj de la supre aluditaj reformoj, Tutnetaŭgis konfidis ilian plenumon al la malnovaj, malsaĝaj oficistoj, kiuj estis iliaj malamikoj. Kia karikaturo kaj kia malutilo fariĝis el tio por Egipto, tion facile komprenos ne nur tiel penetranta prudento kiel la via, ho sinjoro, aŭ, kiel la menso de l' krokodilo, kato aŭ iĥneŭmono, sed eĉ la ordinara, malprofunda animo de l' homo. Tutnetaŭgis estis tro malkapabla,

por kompreni, ke la ŝtato devas esti rekonstruita de la fundamentoj ĝis la pinto, kaj tro malmulte honesta, por enkonduki konsciencen eĉ tiujn ŝanĝojn, kies necescon konfesis kaj komprenis la Faraono mem.

— La ibiso min piedbatu — ekkriis Oziris, alĵetante ŝarĝetojn sur ambaŭ teterojn — se mi scias, kiu el ili fine superpezos.

Kaj la vortoj de l' Saĝeco fluis plue:

— Li trompis egale la Faraonon, kiel la popolon. Al la Faraono li minacis, ke la popolo ribelos, kaj al la popolo li inokulis la konvinkon, ke la Faraono volas ĝin teni en mallibereco. Li iom malvastigis la povon de l' Faraono, sed ne plivastigis la liberecon del' popolo. Dum lia tempo pligrandigis la malsateca mizero en Egipto kaj la lando pleniĝis de rabistoj.


— Glor' al Dio, tio estas, glor' al mi mem! — ekvokis Oziris — tie-ĉi almenaŭ ne ekzistas jam ia dubo, ke tio estas plej evidentaj kanajlaĵoj.

— Ho! ne nur kanajlaĵoj — rediris kviete la Saĝeco — ĉar Tutnetaŭgis montris ĉe tio malpli da prudento, ol ĝin posedas la veziko de kamelo. Liaj faraĵoj estis malbonaŭguraj, sed li mem estis malsaĝulo, kaj lia malsaĝeco estis tiom pli granda, ke li mem opiniis sin saĝa. Li ne estis kapabla kompreni, ke, kie oni bezonas grandan korean politikon, tie ne povas sufiĉi brokantado, kaj li ŝakris, ŝakris senfine.

— Vere! vi estas prava, kiel ĉiam, kaj nur tiel preciza pesilo, kiel la mia,

povas montri al ni, kion oni devas fari kun li.

— Kelke da vortoj mi devas ankoraŭ aldoni, ho Ĉiegloboforma! Tutnetaŭgis mokis Egipton, ne zorgis pri la Faraono, klopodis ĉiam nur por si, sekve oni povus opinii, ke li estis nur kanajlo. Sed konsideru tamen, sinjoro, ke, se Tutnetaŭgis estus reginta saĝe kaj honeste, tion profitus Egipto, profitus la Faraono, kaj li mem ne sole ne perdus ion el la propraj



profitoj, sed fariĝus ankoraŭ pli potenca, kaj la juĝo de l' historio pri li estus tute alia.

— Sekve vi ree volas diri, ke tamen la azeno superpezadis en li la friponon?

Levu, ho Justulo, la pesilon, kaj ni tuj konvinkigos.

Oziris levis la pestelerojn kaj tenis ilin alte, ĝis ili tute trankviliĝis. Poste li ekrigardis, kaj la miro kaj kune ankaŭ la konfuzeco speguliĝis sur lia dia vizaĝo.

— Pro l' sankta vosto de-l' Apis! — li ekvokis — la malsaĝeco kaj la friponeco ne superpezas unu la alian eĉ je unu haro el mia barbo. Kion fari nun!...

Kion fari!...

La Asturokula forĵetis la pesilon, ĉirkaŭprenis sian kapon per la manplatoj kaj duonfermis la okulojn.

Tamen post momento lian vizaĝon heligis radia rideto, kaj, turninte sin al Tutnetaŭgis, li komencis paroli malrapide kaj solene:

— Ekscelenco! Neniu el la grekaj, feniciaj, nek el la ĉi-tieaj pli junaj dioj scius, kion fari kun vi, ĉar vi vidas, ke

eĉ la Sageco skrapetas en tiu-ĉi momento sian kapon.

... Sed ne vane la dioj kaj la homoj nomas min Ĉiopova, ĉar jen per mia ĉiopoveco mi distranĉas, kvazaŭ per la glavo de l' Faraono, ĉiujn malfacilecojn kaj anoncas al vi la sekvantan verdikton:

... Revenu al la vivo kaj revenu sur la teron. Estu ĝis la fino del' mondo la ministro de la Faraonoj kaj diversaj popoloj: klopodu, turnu, konduku, prezidu regu...

... Kaj kiam plenigos la jarcentoj, fine devas montriĝi, ĉu vi estas pli granda fripono, aŭ azeno...

... Tiam ankaŭ mi scios, kiu el la ambaŭ spiritoj devas al vi prepari eternan rezidencon.

Tion dirinte, li turnis Tutnetaŭgison vizaĝe al la ĉiela ŝtuparo kaj per subita eksvingo de sia dia piedo plirapidigis lian revenon sur la teron.

En la abismoj de la eterneco ekregis profunda silento; sed Egipto preparis evidente ovacion al la reviviĝinta Ekscelenco, ĉar ĝis la pordegoj de la ĉielo komencis alflugi la ĥoraj voĉoj, kantantaj ĝoje:

— Tutnetaŭgis! Ho, Tutnetaŭgis!
La Sageco komencis ridi mallaŭte.

Esperantigis

Anton Grabsky



MIA AMIKO

FILIBERTO BAŬDETO, ANO DE L' FRANCA INSTITUTO *)

(Barĉanaĵo).

Mia amiko Filiberto Baŭdeto estas blankbarbulo. Nek dekstren nek maldekstren rigardante, li ĉiam rapide iras sur la strato. Li estas cetere vera scienculo, matematikisto, filozofo, logikulo, krom tio ano de l' franca Instituto kaj de multaj fremdaj Akademioj. La anglajn pensulojn, abomenindajn empirikistojn, li absolute malŝatas... Li ĝenerale ŝajnas malfeliĉa.

Gravan raporton li verkis pri la alfabeto, montrante per multaj ekzemploj, ke nia latina alfabeto (kiel cetere ĉiuj aliaj) ne estas logika. Kial, li diras, oni ne skribas ĉiujn vokalojn per kurbaj linioj kaj ĉiujn konsonantojn per rektaj? Tiamaniere oni tujekkonus la diversajn literojn. Ĉu iu kuraĝus diri, ke tio ne estus pli logika, do pli perfekta? Ĉu aliflanke oni ne devus ordigi la literojn laŭ la loko de ilia elparolo en la buŝo aŭ en la gorgo? Dank' al tio oni tuj scius, kiel oni devas elparoli ĉiujn literojn. Sed—li aldonas—miaj kolegoj kaj kunfratoj, ne ŝatas la puran, la sanktan logikon... Empirikistoj ili estas, kompatindaj aposterioruloj! —

Kun kía esprimo de malestimeco li tion diras, mi ne povas priskribi.

Antaŭ unu semajno mi renkontis lin sur la Placo S-t Michel, dum li iris al la Instituto. Kvankam li tre rapidis, li prenis la butonon de mia vesto kaj diris:

„Ĉu vi vidas tiujn virojn? ĉu vi vidas tiujn virinojn? Ĉu iaj viroj ne estas pli grandaj ol aliaj? ĉu iaj virinoj ne estas eĉ pli grandaj ol kelkaj viroj?“—„Kompreneble, mi respondis“.

„Ĉu ne estus pli logike, ke ĉiuj viroj estu altaj ekzemple 1,75 m., kaj ĉiuj virinoj 1,65 m.? Tiamaniere tuj oni distingus la virojn de la virinoj! Kaj rimarku, mi petas, la grandegan profiton por la tajloroj kaj por ĉiuj: la ĵakoj, la vestoj, la roboj la ĉapeloj, la ŝuoj estus samaj por ĉiuj!... ne nur multe da mono oni tiel ŝparus, sed multe da tempo oni gajnus... Ĉu oni me povus ordoni leĝe, ke la viroj de certa kresko edziĝu kun virinoj de sama difinita kresko? Baldaŭ ni havus logike

*) El ora libro de la „Pariza Barĉo“.

bonformitan rason... tiel agis Frederiko, prusa reĝo por havigi al si belajn gardostarantojn... Pri tio mi parolis kun multaj deputatoj, sed ili nur ridetis je mia propono... Niaj leĝdonantoj estas nur empirikistoj, kompatindaj aposterioruloj!"

Antaŭ kelkaj jaroj li montris al mi, dum la Universala Ekspozicio, vagonaron, kiun li estis konstruinta. La vagonoj glitis sur akvo fluanta inter la glitiloj kaj la reloj. La veturado estis rapidega kaj tre komforta. Nu, li diris al mi, konsideru, amiko, kian malfeliĉon alportis al la mondo la homoj, kiuj tro frue akceptis la nunan radsistemon! Ĉar oni konstruis sur la tuta tero relvojojn, oni nun ne plu volas ŝanĝi kaj mia pli bona sistemo nenian ŝancon havas iam sukcesi. Se nur la homoj sciis atendi, ĝis oni alportos al ili bonan perfektan, logikan sistemon.

„Vi estas sendube prava, mi rediris, sed ni estas senpaciencaj, ni volas agi, la agado estas nia vivo kaj ni timas, se ni tro prokrastas la agadon, ke ni mortos antaŭ ol ni agos!...

Mire li rigardis min, kaj per voĉo tremanta balbutis: „Malfeliĉulo, vi ankaŭ, vi estas malsana, vi estas empirikisto, aposteriorulo!..." Kaj skuante la kapon, li forpermesis min per la mano.

Mia amiko edziĝis antaŭ multaj jaroj. Kiam li edziĝis, li estis en ne tre bona farto kaj suferis stomakajn dolorojn. „Nu, diris Filiberto al sia juna edzino, ĉu vi ne opinias, ke tiu viro ne devus iĝi patro, kiu ne tre bone fartas?" — Rugiĝante, mallevante la ĉarmajn okulojn, ŝi konsentis.

... Bedaurinde, kiam li ree estis tute sana, lia edzino siavice malnsanetis... kaj ĉiam, per stranga fatalo, unu el ambaŭ geedzoj ne estis en tute bona stato (kiel diras niaj anglaj amikoj). Nur unu fojon la malfeliĉaj geedzoj estis en normalaj kondiĉoj, sed tio okazis dum vojaĝo, kiun faris sola S-ino Filibertino en Suda Francujo, al siaj bogepatroj.

Nun li estas sesdek, ŝi kvindekjara. Ili ne havas idojn. Sed li konsoliĝas, dirante. „Verŝajne miaj infanoj ne estus bonformaj, ne estus perfektaj. Se ĉiuj homoj min imitus baldaŭ ekzistus sur la tero nur perfektaj homoj!"

Mallaŭte mi aldonis, por lin ne malĝojigi... „aŭ neniu!"

* * *

Mi nun evitas mian amikon Filiberton Baŭdeton, anon de l' franca Instituto. Ĉirkaŭ si li semas senkuragon.

Ni ne aŭskultu tiujn konsilantojn. Nur en agado estas sufiĉa motivo por vivi.

Ni agu kaj fosu nian sulkon!

* * *

P.S. Ĉu mi bezonas aldoni, ke S-ro Filiberto Baŭdeto ne ŝatas Esperanton. „Ĝi ne estas perfekta! Por ĝin perfektigi oni devus aldoni kelkajn sufiksojn, forpreni aliajn, elĵeti la akuzativon, reguligi la ordon de la vortoj, sed, antaŭ ĉio, ni devus ŝanĝi la alfabeton, senĉapeliĝi kelkajn literojn kaj precipe skribi la vokalojn per kurbaj linioj k. t. p.

M. Cart

Al niaj amikoj kaj kunlaborantoj.

Al ĉiuj, kiuj alsendis al ni bondezirojn kaj promesis sian kunlaboradon en nia organo, nome al S-roj: BEAUDOUIN DE COURTENAY, BOIRAC, BOURLET, CART, DĄBROWSKI, EVSTIFIEJEF, KOFMAN, LENGYEL, MOCH, MYBS, PELLETIER, R. DE SAUSSURE kaj aliaj ni sendas nian koran dankon.

Redakcio.

Kornel Ujejski.

FUNEBRA MARŜO

Melodeklamo al la muziko de Fr. Chopin el Sonato B moll, op. 35.

Kie bruas sonorado? Ĉu en kapo mia?
Kien iras aroj pastraj kun kant' korva tia?
Antaŭ mi funebra iras paŝe veturilo...
Vidon mian mallumigis nigra mortkovrilo!

Ie supre kruco lumas, torĉoj brilas sune,
Kaj mi iras subtenata, — iras oportune.
Senkonscie korpo mia sin antaŭen trenas
Bone! Oni min konduku, kien do mi venas?...

Iras mi en sonĝo kvazaŭ; mi nenion sentas,
Nur en koro kaj en kapo io min turmentas,
Io ungojn endronigas akrajn kaj dolorajn,
Kaj sonoroj bruas, ĝemas, kordojn ŝiras korajn.

Ha... muzikon mi nun aŭdas: ĉarma estas ĉarma...
Fajro en okuloj miaj, tamen frunt' malvarma.
Ĉiuj strange min rigardas, sed el malproksimo:
Sur vizaĝ' ilia vagas kvazaŭ ia timo!

Ĉerkon tiras kvar ĉevaloj en funebra vesto
Kaj min trenas ia forto al terura festo...
Granda Dio, ĉerko tiu sin al mi alŝovas!
Ha! ĉi tie, en la ĉerko mia cel' sin trovas!...

* * *

Kial Vi min punis tiel, Vi kun nomo Dia?
Kial, kial, ho!
Vi, la reĝo de la sunoj kaj de vivo ĉia,
Min disprenis do!
Kie Vi,
Forta Di'?

Ĉu Vin korvoj superbruas, aŭ la ĝema son'?'
Antaŭ mi Li ekaperu kun vid' ironia —
Li—reĝo de l' sort'!

Kvankam—nulo, mi potencas en doloro mia
Pli ol Lia fort'
Li — malbon'!
Li — malbon'!

Per ĉi vorto sonas ĉio,
Jezu', Mario!
Min incitas tiu son'
La son'! la son'!

* * *

Sur veluro dormas bela, plektas manojn ŝi,
Kaj rideto ŝia hela turnas sin al mi!

Vi ne sentas rozodoron de la kron'—ormam';
Miaj kisoj vian koron nun ne vekos jam.

Vi ne scias, ke mi paŝas kvazaŭ senvivul',
Ke la ĉerko Vin forkaŝas for de la okul'!

Ĉu por tio, amikino, floris vi sub sun'
Kaj mi amis Vin ĝis fino por tombigi nun?

Celo mia estas tio? jen edziĝa lit'?
Kaj ĝis nun mi vivas, Dio, mi — solul', ermit'?

Estis dolĉa kaj anĝela kaj min amis ŝi,
Kvazaŭ revoj flugis bela dolĉa temp' por ni!

Tiam estis mi humila, kun anĝela sent';
El rigardo ŝia brila fluis sakrament'.

Al mi donis ŝi inspiron de la virt', geni'
Kaj malfermis la eniron al ĉiel' por mi!

Kien fine min altrenis la kruela sort'?'
Al la tombo mi alvenis, tra esper' — al mort'!

Celo mia estas tio? jen edziĝa lit'?
Kaj ĝis nun mi vivas, Dio, mi solul', ermit'?

* * *

Ĉerkon prenis kaj forportis oni ĝin rapide,
Min haltigi oni penas, ha... ha... vere ride...
For de l' voj'! ĉar malfeliĉo estos malsaĝuloj:
Estas forta mi kaj fajro flamas en okuloj!

Mi nur havas al ŝi rajton, ĉiuj tuj foriru!
Nigra aro! Nur egala kontraŭ mi eliru!
Ne por tia suferado estas via koro!
Ili kuris for, mi iras reĝo de l' doloro!

Tra murmuro kaj la miro, sonorila sono
Mi aliras al la ĉerko—ĝis al mia trono,
Ho fosisto, vi oferon novan nun akiros:
Por enfosi tian reĝon, kiom vi deziros?

Enterigu min profunde, mordas min sufero,
Pli ol via tero nigra premas min aero...
Ne aspergu! ŝin eĉ sankta akvo makuligos:
Mi ĉi tie estas pastro: larmoj ŝin sanktigos!

El sub vesto de monaĥo mano elŝoviĝas —
Tiel luma, tiel forta... mi genufleksiĝas,
Min ektuŝis ĝi, mi falas kvazaŭ senvivulo...
Oni prenis min, sed kien iros mi solulo?

Ha, por iom da feliĉo pagas koro nia
Per da larmoj mar'?

Mond' malsaĝa, mond' mizera, ĉu do estas tia
Celo de l' homar'?

Via ir' —
Mia spir'!

En la mond' mi estas koro, vi nur vana son'!
Ĉu mi petis Vin pri tio, ke la fort' mistera

Alvenigu min?

Kvankam esto min katenas, restis mi libera

Tuj forlasi vin.

Li — malbon'!

Li — malbon'!

Per ĉi vorto sonas ĉio,
Jezu', Mario!

Min incitas tiu son',
La son'! la ŝon'!

Lozo.



Dua cirkulero de la „Kvaro” por la Kvara.

Nur ses monatoj nin disigas de la venonta kongreso, rapide ili pasos kaj la „Kvara” efektiviĝos! Ĝi okazos de la 16-a ĝis la 22-a de Augusto. Tiu ĉi semajno zorgeme estis elektita, konsiderante la diversajn dezirojn de ĉiuj nacioj; la Germana Esperantista Societo en harmonio kun la Centra Oficejo decidis pri la dato. Germanujo esperas, ke la Esperantistoj de la tuta mondo plenumos sian Kembrigan promeson kaj kore ili estos akceptotaj. Ili ĉiuj venu, la pacaj batalantoj por nia sankta afero.

La unua tago de la kongreso estos dimanĉo. Ankaŭ la Kvara komencos per Diservoj, kiuj estas tre grava pruvo por la taŭgeco de Esperanto.

La Majstro venos, ne timante, malgraŭ sia ne tre bona sano, la lacigojn de granda kongreso. Kaj ĉiuj Germanoj devas uzi la favoran okazon, ke ili havos la kongreson en sia propra lando. Ili ne forestu, timante, ke ili ne sufiĉe progresis en la uzado de la lingvo. Komprenoble, ĉiu vizitonto nepre devas bone koni la lingvon, li ĝin senĉese zorge kaj diligente studadu.

La programo enhavos paroladojn, deklamojn, kantojn kaj teatraĵojn, unuvorte, sufiĉe da okazoj, por aŭdi nian lingvon. La Dresdenaj kongresanoj vaporsipe ekskursos al Meissen kaj al la Saksa Svisujo; la ŝipoj estos grandaj parolejoj kaj la vojaĝo donos al la ĉeestantoj agrablajn momentojn de vere frata kunestado.

Ankaŭ en Dresdeno la kongresanoj estos ĉiam kune, oni tion bone aranĝos. Kvankam la urbo estas granda, tamen la efektive plej vizitataj stratoj ne estas multaj. Ni nomu: Prager Strasse, See Strasse, Schloss-Strasse, kaj Brühlsche Terrasse. Kaj se la gastoj tamen forgesus la nomojn de tiujĉi stratoj aŭ la nomon de siaj hoteloj, jam nun 24 policianoj povus montri al ili la vojon, ĉar ili fervore lernas Esperanton. La instruado de la policianoj estas unu el la preparaj laboradoj de la Dresdena grupo.

Alian laboron ĵus finis la Germana Esperantista Societo, ĝi eldonis adresaron:

Germana Jarlibro Esperantista por 1908 *).

Per tiu libreto la Germana Esperantista Societo prezentas al la Esperantistoj malgrandan, sed tamen tre gravan verkon. La nombro de la Esperantistoj tiel rapide kreskas kaj pligrandiĝas, ke internaciaj adresaroj plu ne estas eldoneblaj; la naciaj jarlibroj ilin anstataŭos. Aukaŭ por la eksterlandoj tia nacia libro estas interesa, ĉar ĝi enhavas ankaŭ informojn pri la kongresa urbo, kiuj interesos ĉiujn partoprenantojn ka tial ni petas treege, ke la tutmondaj samideanoj aĉetu nian libron.

Samvalora estas artikolo pri la historio de Esperanto, ĝi estos ĝermo de iama scienca verketo. Bildoj kaj skizoj pri Dresdeno ornamas la libreton. Aĉetu ĝin!

Dresdeno, koncerne la kongreson, similas abeluĵon. La anoj de la grupo laboras diligente: ili ĉiumaniere ekzercadas la interparoladon kaj ili faris kantunuigon por la ekzercado de la himnoj, kantotaj dum la kongreso. Nova poŝtkarto (propono Elb) ĵus aperis. Ĝi enhavas la Ligokanton de Mozart:

„Fratoj, manon donu kore“ (trad. de L.L. Zamenhof).

Je Sm. 0.05 (M. O. 10) ĝi estas havebla ĉe H. Arnhold, Dresden, Weisenhausstrasse 20.

Alia novaĵo estas: „Sigelmarko“ por la Kvara.

Por akiri artan kaj ornaman propagandan markon por kovertoj rilate al la kvara kongreso oni aranĝis konkurson kun premio inter la studentoj de la Reĝa Armetia Lernejo. Estis sendataj 140 desegnoj, ĉiuj montris intereson kaj komprenon por nia afero, multaj el ili estis spritaj

*) Havebla ĉe D-ro Albert Schramm, Dresden, Ständehaus. Prezo: Sm. 0.50 (M. I.).

kaj talentaj elpensadoj. Nur unu el ili estos enpresota, sed kvin konkursintoj ricevos monan premion.

La samideanoj ilin vidos en la granda kongresa ekspozicio. Jam nun ni atentigas la amikojn je la graveco de tiu ekspozicio kaj petegas ilian energian helpon. Nur tiam ĝi estos valora, se ĝi estos plena, historie ordigita; nenie ĝi montru mankon, kontraŭe, klare oni vidu daŭran kreskadon, la sanan, fortan disvolvon, kaj la nunan staton de nia afero. Tiu kreskado sana kaj regula, neniam kaj neniel interrompita, montru per muta sed komprenebla voĉo la venontan **V e n k o n**.

Ni ne forgesu: Post la kongreso multaj el la gastoj restos kune en „Weisser Hirsch“ (Blanka Cervo) la Esperantista Vilaĝo. Bela prospekto de „Weisser Hirsch“ ĵus aperis. Senpage ĝi estas havebla ĉe D-ro Schramm, Dresden, Ständehaus. Oni nur bonvolu sendi la poŝtpagon per „Coupon-Réponse International“ (Internacia respondkupono) po 0,25 M. aŭ 0,30 fk.

La Kvaro por la Kvara.

D-ro Mybs. D-ro Schramm.

Marie Hankel. Arnhold.

Esperanta Vilaĝo Weisser Hirsch.

